★ NORDA GAZETO

DUMONATA BULTENO
DE LA
NORDFRANCA ESPERANTO-FEDERACIO

Redaktoro kaj responda eldonanto :
Lucien BOURGOIS,
21, Rue Gambetta,
NOYELLES-GODAULT (P.-de-C.).
Ĉiun presigotan materialon
oni sendu al la ĉisupra adreso.

Kotizoj (kun bulteno)

a) Junuloj : 2 Fr.
b) Aktiva membreco : 3 Fr.
c) Subtenanto : 5 Fr.

pagendaj al C.C.P. LILLE 517-15.
Fédération Espérantiste du Nord,
17, Rue des Bouvreuils, ARRAS (P.-de-C.).

---

Ĝenerala Sekretario : Fernand DITACROUTE, 178, Chemin Castre, CALAIS (P.-de-C.).

---

Informilo n°2 Marto-Aprilo 1964

Estimataj Gesamideanoj,

La Nordfranca Esperanto-Federacio elkore invitas vin multnombre partopreni ĝian jaran kongreson, kiu okazos en LILLE, en la kadro de la manifestacioj de la Internacia Foiro, dimanĉe 3-an de Majo 1964, laŭ la jena programo :

| | |
|---|---|
| 9.45 h. | Rendevuo en la Ĉefhalo (Grand Palais). |
| 10.00 h. | Malfermo de la laborkunsido en Salono C. |
| 11.00 h. | Distra programero. |
| 12.30 h. | Honorvino ĉe la unua etaĝo, en la bankedejo. |
| 13.00 h. | Bankedo - Prezo : 20 F. (trinkmono entenata). |
| 15.00 h. | Posttagmeza amika kunveno en la sama salono aŭ libera vizito de la foiro. |

Nepre ĉeestu! Bonvenon al ĉiuj!

La federacia estraro.

Se dezirate, vi povas antaŭpagi per poŝtpagilo aŭ ĝirĉeko al CCP : LILLE 559.00.
- S-ro BOUQUIN Etienne, 68, rue du Général-Leclercq, RONCHIN (Nord).

Ĉu vi antaŭpagos aŭ ne, tamen avertu lin pri via bankedpartopreno, antaŭ la 25-a de Aprilo (limdato)!

N.B.- La kunsendita karto signita per federacia stampo validas kiel senpaga foir-enirilo.

MENUO :

Savoja Ramkeno
Madejre Patita Frikando
Spinaca Velurecaĵo
Molmaturaj Pomoj
Diversaj Fromaĝoj
Kuko "Grand Palais"

Vinoj :

Supera bordoza Rions-Vino
" du Tertre-Kastela Vino 1959 "

Kafo - Likvoroj

Kongresrabatiloj : Por ricevi fervojajn kongresrabatilojn, oni sin turnu, kunsendante reafrankon, al :

- S-ro CURNELLE René, 26, rue des Martyrs-de-la-Résistance,
LAMBERSART (Nord).

Ankaŭ, li povas havigi pliajn senpagajn foir-enirilojn.

---

Daŭra pliriĉiĝo de la Federacia Biblioteko :

Kun granda plezuro k dankemo ni ricevis de S-ro CONTART, el NORRENT-FONTES la jenan libron, kiel donacon : Tartarin de Taraskono.

Alia ĵusa akiritaĵo estas la organo de la Esperantistaj Kampadistoj.

Ambaŭ titoloj estas de nun prunteblaj de niaj legemaj membroj.

"La laboro por Esperanto donas nek gloron nek honoron. Ankoraŭ ne. Almenaŭ ne en la ekstera mondo. Kaj interne de la Movado neniu vere saĝa k sincera laboranto ilin pretendas. Kion oni rajtas postuli pli ol prave, estas tiu elementa respekto, kiun ĉiu ordinara homo ĝuas en civilizita socio k kiun li despli prave devus havi en kultura movado. Kaj tio ĉe ni bedaŭrinde ankoraŭ forestas en multaj kazoj, kio, tute senkonsidere al la pure persona momento, danĝere malhelpas la progresadon. Laboro sub premo de afliktita koro kvalite neniam egalas al tiu farata kun ĝojo k plezuro, nek ĝi povas esti inspira por aliaj."

Ivo LAPENNA, Ĝenerala Sekretario
de Universala Esperanto-Asocio.

Nova eldonaĵo :

"L'Espéranto, langue littéraire" : 20-paĝa broŝuro en franca lingvo.
Verkis : Ivo LAPENNA. Prezo : (afrankite) 1 Fr. Mendebla al U.F.E.

Esperantlingvaj turismaj faldfolioj : Estas ebleco peti turismajn presaĵojn en Esperanto.
Ben BUTTERFIELS, Director of Sales Promotion,
U.S. Travel Service, U.S. Department of Commerce,
WASHINGTON 25, D.C. (U.S.A.) estas la persono alskribenda.

Nova lernolibro : S-ro Pierre DELAIRE ĵus eldonis binditan lernolibron "L'Espéranto vivant" (324 p.) - Prezo afrankite : 19,50 Fr.

Federacia konkurso : S-ro A. LEENHARD (Nederlando) k C. MALLIA (Malto) gajnis resp. la librojn "LINGVAJ RESPONDOJ" k "ANDORO". Gratulojn!

Nova temo : "Kion vi ŝatas, k ŝatus, dum kluba kunveno?"

Sendu 100-linian tekston antaŭ la 1-a de julio al :
Esperanto, 7, rue Saint-Saëns, WATTRELOS (Nord).

## PROMOCIO :

Atingis nin la sciigo, ke S-ro Maurice GENEVOIX, Dumviva Sekretario de la Franca Akademio, altiĝis je la grandkruca grado en la Honor-Legio.

Al la eminenta Patrono de la Franca Informkomitato pri Esperanto, la Nordfranca Esperanto-Federacio direktas sian sinceran gratulon.

## NOVAĴOJ PRI NIA FEDERACIA FAMILIO :

Al ĉiuj siaj geamikoj, membroj de la Nordfranca Esperanto-Federacio, Ges-roj Georges ODENT ĝoje sciigas pri alveno de eta Jean-Michel, frato de Dominique k Marie-Christine, la 30-an de januaro 1964.

17, rue des Bouvreuils, ARRAS (P.-de-C.).

En lasta novembro, S-ro Marcel LESOIN, Honora Prezidanto de Lille-Esperanto, estis vundita en trafikakcidento (pelvofrakturo).

Li restadis 5 monatojn en hospitalo sed rehejmiĝis komence de marto. Malgraŭ liaj suferoj, lia kutima bonhumoro restis senŝanĝa.

Al nia simpatia amiko ni deziras plenan resaniĝon.

Adreso : 40, rue du Capitaine Ferber, LILLE (Nord).

## EĤOJ EL CALAIS :

La kalezaj esperantistoj revigliĝas! La iamaj membroj de "Verda Stelo" k aliaj praktikantoj de la internacia lingvo kunvenis, la 19-an de januaro ĉe Salono Righetti (la teatra kafejo), Boulevard Pasteur, sub la prezido de S-ro BUERICK.

Ili decidis fondi novan grupon sub la nomo : "Kultura Kaleza Centro".

S-ro PERRIN estis elektita Honorprezidanto; k S-ro BUERICK fariĝis funkcianta Prezidanto.

Sekretario : S-ro Edouard BONVOISIN.- Kasisto : S-ro Fernand DITACROUTE.

Komitatanoj : S-roj SERGENT, DUCROCQ, PERRIN k S-ino MERLEN.

Inter la membroj troviĝas la federacia kasisto, S-ro Jacques DOYELLE, nia dana amiko el Brêmes-les-Ardres, S-ro SKOLE (emerita lernejestro), k S-ro POULAIN, Apotekisto en Licques.

La nova grupo decidis preni sur sin la organizadon de la 3-a Markola Kongreso.

La Federacio ne dubas, ke tia valora teamo sukcesos disvastigi esperanton en la urbo de la heroaj Burĝoj!

## AMIENS-ESPERANTO aktivas!

La loka grupo aperigis en la lokaj gazetoj anoncon pri perkorespondaj kursoj. Enskribiĝis kelkaj interesatoj, kiuj ankaŭ aliĝis al la federacio. Dankon k gratulon pro la efika propagando!

<u>TOURCOING</u> : Dua kunveno de la nova klubo okazis la 5-an de marto.
Temoj : magnetofona respondo al italaj gastoj k diskoj en esperanto.

Gajnis la demand-ludon : A. LABIT, G. PREUX k R. LEGRAND.

<u>WATTRELOS</u> : S-ino R. AAGAARD, el Auckland (Novzelando) prezentis diapozitivojn k respondis al ĉ. 100 demandoj pri sia antipoda lando.

Ŝi inaŭguris la serion de debatoj, kiujn iniciatis la sekcio de la Departementa Centro por Kulturaj Interŝanĝoj.

<u>ROUBAIX</u> : Eks-UEA-delegito ricevis inform-peton de pola E-ĵurnalisto, kiu baldaŭ vojaĝos al Francujo. Detaloj mankas.

## KOMPLETIGU VIAN ADRESARON :

Ni bonvenigas jenajn novajn membrojn :

| | | |
|---|---|---|
| Amiens (Somme) | S-ro FROIDURE Jean | 33, Avenue de Picardie. |
| " | S-ro JACOB Jean-Claude | 63, Rue Delpech. |
| " | S-ro OSSET Henri | 10, Rue Saint-Simon. |
| " | S-ro PETIT Jean-Pierre | 6, Impasse Legris. |
| " | F-ino RAMON Simone | 1, Rue des Clairons. |
| " | F-ino SOYEZ Yvette | 72, Rue Delpech (H.L.M.). |
| " | S-ro SUSZKO Daniel | 17, Rue Henri-Daussy. |
| " | S-ro TEMPEZ Christian | 48, Rue de l'Amiral-Perrée. |
| Hénin-Liétard (P.-de-C.) | F-ino BOCKTAELS Danièle | 8, Rue Loubet. |
| Marly-les-Valenciennes (Nord) | F-ino GILLIARD Edith | 1, Rue Emile-Zola. |
| Noyelles-Godault (P.-de-C.) | F-ino BORG Félicité, ĉe S-ro Jack FYNN, Rue de Verdun. | |
| Quévauvillers (Somme) | S-ro RABEUF Jean. | |
| Roubaix (Nord) | S-ro CNUDDE A. | 171/4, Rue Henri-Regnault. |
| Tourcoing (Nord) | S-ro STRAGIER | 34, Rue des Ursulines. |
| Valenciennes (Nord) | S-ro HAMM Pascal | 31, Rue Kilmaine. |
| " | F-ino VASSEUR | 26, Rue Emmanuel-Rey. |
| " | S-ro TELLE Jacques | Rue de la Fosse-St-Waast. |
| Vieux-Condé (Nord) | F-ino JAONEN Danièle | 39, Rue Camélinat. |

## ADRESŜANĜO :

S-ro ANCHER, antaŭe en Amiens loĝas nun en Bar-le-Duc (Meuse),
Chemin des Vaux-de-Naives.

## Kalendaro de la Esperanto-Kongresoj 1964

| | |
|---|---|
| 25/26 Aprilo | 32-a NORMANDA ESPERANTO-KONGRESO EN LISIEUX. Informojn havigas : S-ino RAULT Andrée, 4bis, rue de Caumont, LISIEUX (Calvados). |
| 3-an de Majo | Jara Kongreso de la Nordfranca Esperanto-Federacio en Lille. |
| 9/15 Majo | Fervojista Kongreso en Bruselo k Antverpeno. |
| 15/18 Majo | Nacia Kongreso de la Belga Ligo en Liège. |
| 16/18 Majo (Pentekoste) | 56-a NACIA KONGRESO DE U.F.E. en Parizo. |
| 25/31 Julio | Internacia Kongreso de SAT en Narbonne (SAT, 67, Avenue Gambetta, PARIS - 20°). |
| 1/8 Aŭgusto | 49-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN HAGO. |

Pri la ĉisupra kongreso kaj la 56-a en Parizo informas : U.F.E., 34, rue de Chabrol, PARIS (10°).

GRAVA : Ne forgesu ke, de Pasko ĝis la jarfino, la Kultura Domo de Francaj Esperantistoj atendas vin: Château de Grésillon, BAUGE (M. et L.).

## TEORIO DE ESPERANTO (de VARANKIN).

"El 2.574 vortoj, kiujn enhavas la vortlibro publikigita de ZAMENHOF, troviĝas :

516 vortoj komunaj al ĉiuj lingvoj de la hindeŭropa familio;
Ĉefe ili estas sciencaj vortoj, grandparte etimologie grekdevenaj;
405 aliaj sciencaj terminoj, samgrade internaciaj havas latinan etimologion;
559 apartenas al la moderna franca lingvo;
404 estas komunaj al la lingvoj franca kaj angla;
129 estas komunaj al la lingvoj franca, angla kaj germana;
86 apartenas al la moderna angla lingvo;
138 apartenas al la moderna germana lingvo;
98 estas komunaj al la lingvoj germana kaj angla;
16 estas komunaj al la lingvoj germana kaj franca;
55 estas komunaj al la lingvoj franca kaj rusa;
33 apartenas al la rusa;
9 estas komunaj al la rusa kaj angla;
3 fontas el la moderngreka;
79 apartenas al diversaj lingvoj (araba, slava, ktp.)."

El sume 2.574 vortoj,
343, nome : ĉ. 13 % ne estas uzataj en la franca;
780, nome : ĉ. 30 % ne estas uzataj en la angla;
824, nome : ĉ. 32 % ne estas uzataj en la germana;
1512, nome : ĉ. 60 % ne estas uzataj en la rusa.

ĉ. = ĉirkaŭ

Resume, el la esperantaj radikoj, 87 % estas uzataj en la moderna franca lingvo. Krom tio, oni elkalkulis 63 % el la esperantaj radikoj de tipe latinida origino.

Kvankam jena fakto estas preskaŭ nekonata, la strukturo kaj la gramatiko de Esperanto multe diferencas tiujn proprajn al la eŭropaj fleksiaj lingvoj.

Cetere, en sia "Unua Libro", ZAMENHOF implicite difinis la neeŭropan karakteron de la esperanta gramatiko. La morfologia strukturo de tiu lingvo estas tre parenca al la unusilabaj lingvoj, kies tipo estas la ĉina, kaj ĝi pli speciale montras similecon kun la aglutinaj lingvoj de la familio uralo-altaja, kun la dialektoj de la indiĝenoj el Afriko, Ameriko, Aŭstralio, Malezio kaj Polinezio, ankaŭ kun la lingvoj hungara, turka, vaska, tatara, finna, ktp.

Ĝia vorttrezoro igas Esperanton lingvo esence eŭropa; ĝia videble ekstereŭropa strukturo parencigas ĝin kun la aziaj kaj orientaj lingvoj, kies fundamentajn konstrumetodajn karakterizaĵojn ĝi posedas.

Tiu ĉi ecaro propra al Esperanto estas feliĉa trajto de la genio de ĝia kreinto. Li sukcesis adapti la hindeŭropan vortprovizon kun la orienta lingvostrukturo. El tio oni povas konkludi, ke Esperanto ja ĉiel estas eminente internacia lingvo, konstruita laŭ internaciaj principoj.

(El : "Historique du Mouvement Espérantiste à Dunkerque"
de Claude VERNAY).

Elfrancigis : Lucien BOURGOIS.

NIA FELIETONO : "KAROTHARULO", de Jules RENARD (trad. Jean LENEL).

Karotharulo : - Vere, ĉi tiun mi povas pafi, mi estas certa.
Frato Felikso : - Flankiĝu, ke mi vidu! Jes, ja vi havas ĝin bele.
Rapidu, pruntu vian karabenon!

Kaj jam Karotharulo kun la manoj malplenaj, senarmigite oscedas : ĉe lia loko, antaŭ li, frato Felikso alŝultrigas, celas, pafas; k la pasero falas.

Estas kvazaŭ iluziisaĵo. Antaŭmomente, Karotharulo premis la karabenon sur sia brusto. Subite, li ĝin perdis; k nun ĝin retrovas, ĉar frato Felikso ĵus redonis ĝin al li, poste farante sin hundo, li kuras preni la paseron k diras :

- Vi tro malrapidas, necesas iom nin urĝi.

Karotharulo : - Iom multe.
Frato Felikso : - Ho, vi koleretas!
Karotharulo : - Jes ja, ĉu vi volas, ke mi kantu?
Frato Felikso : - Sed ĉar ni havas la paseron, pri kio vi plendas? Imagu, ke ni povis ĝin maltrafi.
Karotharulo : - Ho! mi...
Frato Felikso : - Vi aŭ mi, estas same. Hodiaŭ mi mortpafis ĝin, alian vi mortpafos morgaŭ!
Karotharulo : - Ha! morgaŭ.
Frato Felikso : - Tion mi promesas al vi.
Karotharulo : - Mi scias. Vi promesas tion la antaŭtagon.
Frato Felikso : - Mi ĵuras tion al vi; ĉu vi estas kontenta?
Karotharulo : - Fine!... Sed, se ni tuj serĉus alian paseron; mi provus la karabenon.
Frato Felikso : - Ne, tro malfruas. Ni reiru hejmen, por ke Panjo kuiru ĉi tiun. Mi donas ĝin al vi. Ŝovu ĝin en vian poŝon, stultuleto k lasu la bekon ekstere!

Ambaŭ ĉasistoj reiras hejmen. De temp' al tempo ili renkontas kamparanon, kiu salutas ilin k diras :

- Knaboj, mi supozas, ke vi ne mortpafis la patron - ĉu ne?

Flatita, Karotharulo forgesas sian rankoron. Ili alvenas repaciĝintaj, triumfantaj k tuj kiam li ekvidas ilin, sinjoro Lepik miras :

- Ĉu eble? Karotharulo, vi ankoraŭ portas la karabenon! Ĉu vi do portis ĝin la tutan tempon?

- Preskaŭ, diras Karotharulo.

(Sekvota)

---

ĈU VIA KOTIZO ESTAS DENOVE PAGENDA?

Se vi ankoraŭ ne pagis la jarkotizon 1964, nepre sendu la monon al CCP LILLE 517-15 (vidu la frontpaĝon!).

Eĉ modesta mon-kontribuaĵo estos bonvena.

Antaŭdankon!

---

Le Gérant responsable : Lucien BOURGOIS, 21, Rue Gambetta, Noyelles-Godault (Pas-de-Calais).